


TRIMONATA REVUO
jan.- mar. 1980
N-ro 16 vol 5

# LA SKOLTA MONDO

OFICIALA ORGANO DE LA SKOLTA ESPERANTO LIGO

# Safario en Afriko.

Kiel vi scias mi estas fervora natur-amiko kaj unu el la plej grandaj deziroj ĉiam estis ke mi iam povu viziti Afrikon por partopreni Safarion.

Antaŭe safario estis vojaĝo dum kiu oni ĉasas,sed nuntempe oni ĝenerale ne plu ĉasas per pafilo, sed per foto-aparato.

Mi vivas tre modeste - tiel mi sukcesis ŝpari iom da mono kaj tiel feliĉe pasintjare povis realigi mian revon.

Vere estis impona sperto travagi la arbarojn kaj savanojn kaj pristudi la vivon de la bestoj, kaj mi dum longe povus paroli pri tio. Por tio nun mankas la tempo, sed kiam vi vizitos min, mi estos feliĉa montri al vi la belajn fotojn, kiujn mi faris.

Nur unu sperton mi ĉi tie rakontos al vi.

Dum ia nokto ni loĝis en kabano ĉe la rando de savano, en regiono kie loĝas multaj sovaĝaj bestoj. Tie mi havis unu el la plej imponaj spertoj de mia vojaĝo.

Dum la nokto ni vekiĝis pro terura bruo. Ni ellitiĝis kaj rigardis el la fenestro. Feliĉe la nokto ne estis tre malluma, ĉar la luno brilis en la steloplena ĉielo.

Ni vidis cervon kiu venis por manĝi de la arbustoj apud la kabano. Sed samtempe du rabobestoj venis por ataki la cervon: granda flavebruna leono kaj malpli granda sed forta kaj vigla tigro. Dum pli ol du horoj ili batalis, ĝis fine la tigro malaperis.

La leono tamen ankaŭ ne havis multe da feliĉo ĉar dum la batalo la cervo kompreneble jam malaperis...

## S T R A N G A R A K O N T O

Denove rakonto, kiu enhavas nepre ian eraron.

Kiam vi trovis la nekorektaĵon vi dum unu monato post la ricevo de la revuo povas sendi vian opinion al la sekretario.

Kaj ni invitas vin, ke vi aldone sendu ian kontribuon por 'La Skolta Mondo': rakonton aŭ raporton, desegnon aŭ foton, aŭ kion ajn.

Eble por la sendintoj estos malgranda donaco !




VASTAJ HORIZONTOJ

La kajero jam aperis en la lingvoj:

angla
franca
germana
hispana
japana
kataluna
nederlanda
norvega
sveda

Mendu ĉe via NR aŭ ĉe SEL, postbus 433 , NL 1500 EK Zaandam

Prezo: Ned gld 1.50 (por 10 ekz. aŭ pli po ned gld 1.oo

# *Ekzameno de ministo*

Kiel ekzemplo el la sveda literaturo ni redonas fragmenton el la libro "La lupe grizaj" de Helmer Linderholm. La aŭtoro naskiĝis 1916 kaj sin vivtenis kiel bakisto ĝis li en 1942 debutis.

Nun mi rakontu la pezan historion pri la tragika sorto de Sokrates Karlsson. Per tremantaj manoj mi enskribas la okazintaĵon en mian taglibron, kaj mia kara edzino sidas en la kuirejo kun la okuloj blindigitaj pro larmoj.

Jam la pli granda parto de la dimanĉa antaŭtagmezo forpasis, kaj mi ne povis imagi, ke iu el la ministaro honorus min veni, ĉar en la antaŭa vespero okazis la duobla kunveno. Dum tiu kolektiĝas la partoposedantoj de la fandejo, la sendependaj, aŭtoritathavaj ministoj en siaj nigraj, butonitaj longaj surtutoj, kun la nigra larĝĉapelo ĉe la nuko kaj la malpeza, akra ministohakilo kiel honoraĵo kaj apogilo. En la fandejo decidiĝis, akompanite de la sono de ĵetkuboj kaj tintado de trinkokruĉoj, per tri ĵetoj per la kubo por ĉiu el la posedantoj, la vicon per kiu oni komenciĝos la fandadon en la malgranda, per trunkoj ĉirkaŭata, fandujo.

Dum la pli longa parto de la jaro ĝi kuŝis tie apud la digo kvazaŭ forgesita, dum la ministoj elhakis sian minaĵon aŭ faris sian karbon kaj atendis la printempan degeladon kiam la akvonivelo altiĝis ĉe la fandeja digo. Tiam oni antaŭhejtis la fandujon ĝisrande plenan da lignobrulaĵo kaj lignokarbaĵo, ĝis la forna ŝtonkonstruaĵo, la tera kovrilo kaj la ekstera lignomuro travarmiĝis.

Kaj jen la tempo venis por la feliĉulo, kiu per la diverdikto de la ĵetkuboj elektiĝis, kiel la unua surmeti siajn proprajn karbojn, enmeti sian minaĵon, lerte miksitan per kalko, kaj zorge atenti ke la hejtado ne fariĝu tia, ke la konstruo de la hejtorezistaj ŝtonoj difektiĝus. Nun oni allasas la akvon al la grandega rado, la aerumiloj komencas ventumo, kaj la fandado komenciĝas dum la fajro el la forno sin levas ĝis vira alteco el la supro de la forno, kaj la fero blankardante fluas al la sabla muldformo.

Tiu festotempo de Bergslagen nun staris je la pordo - sed ĉe mia pordo nun staris la ministo Sokrates Karlsson, kiun helpis la servanto el la ĉevalvagono, kaj kiu per lamantaj paŝoj gvidiĝis al la pordo. Lia vizaĝo portis ĉiajn signojn de doloroj kaj veoj, larmoj fluis ĉe la nazo, kaj mi singarde kaptis lin:

"Kara iu, kio okazis? Sidiĝu, tamen!"

Sed la ministo rifuzis sidiĝi. Anstataŭe li sin apogis al la pordokadro kun la vizaĝo al la muro, kaj petis, ke mia kara edzino lasu nin solaj, ĉar tio estas afero nur por viroj.

"Ĉu en la internaĵo, aŭ..."

Li turnis la rigardon for, sed kiam ni estis solaj sin antaŭenklinis super mian tablon, ĝemante.

"En la postaĵo, bona doktoro, en la postaĵo!"

Per komunaj fortoj ni deprenis la honorindan ministosurtuton, same liajn bone butonitajn ĝisgenuajn pantalonojn, kaj en lia postaĵo vidiĝis aro da novaj sangegantaj vundoj. Li grincis per la dentoj kaj plendis dum mi traserĉis la vundojn ke neniu vitropeco restadu tie, antaŭ ol kudri kaj bandaĝi.

"Sed kara ministo, kiel tio ĉi povis okazi?"

Li ploris, sed fine komencis priparoli sian sorton. Rapide kiel la akvo de la ĉefandeja akvofalo ĉio torentis el li, kaj miaj manoj ektremblis kiam mi volis kudri kaj bandaĝi.

"Ĉio devenas de tiu malbenita ekzameno de ministo. Sciu, mi havas malforton rilate al la brando, mi ne povas nei tion. Kaj mi vane en la duobla kunveno ĉiujare provis montri, ke mi, same bone kiel ĉiu

plenkreskulo povus trapaso almenaŭ la malgrandan ekzamenon. - La doktoro ja konas ĝian postulon?"
Mi kapjesis, sed tion li apenaŭ povis vidi, kaj murmuris ion kompreneman dum mi kudris kaj li ĝemadis.
"Vidu, oni atestu antaŭ la fratoj de la fandejoposedantoj, ke oni almenaŭ povas preni dek drinkojn sinsekve kaj poste senŝanceliĝe promeni unufoje ĉirkaŭ la manĝejtablo sundirekten kaj kontraŭ la sundirekto. Nu, kara iu, ja pluraj trapasis la Grandan Ekzamenon - kvankam mi neniam trafis iun. Tiam oni devis preni dudek grandajn drinkojn kaj poste preni ŝarĝon da fero sur la nukon kaj kun ĝi supreniri la fandforno-supron dum la ventumiloj efikas kaj la fajro sin levas al la nuboj, kaj tie promeni ĉirkaŭon kaj en la direkto kun la suno kaj kontraŭ la suno kaj denove malsupren - kaj sen unufoje stumbli.
Nu, mi estus feliĉa se mi nur povus trapasi Malgrandan Ekzamenon. Sed nenio ja helpis. Mi ekzercadis ofte, jes, en la antaŭtagmezo mem antaŭ la provo, kaj jen tiam ĉio glate sukcesis - sed poste en la vespero, kiam mi montru tion al la tuta posedantaro, jen la kruroj komencis kroĉiĝi jam antaŭ oni finiris la ĉirkaŭon en la sundirekto."
Li forte spiris kelkfoje, kaj jen liaj trajtoj por unu momento ekhavis klarigitan mienon tra la suferoj, kaj li levis sian manon kiel profeto.
"Hieraŭ vespere, bona doktoro.... Hieraŭ vespere mi trapasis la ekzamenon tiel bone kiel iu, kaj eĉ sen iu ajn antaŭa ekzercado. Ĉu oni povas imagi..."
"Gratulon..gratulon", mi murmuris dum mi kudris, kaj li baraktis kiel fiŝo sur hoko, sed li ŝajne forgesis la dolorojn dum li pripensis ĉion, kio okazis al li.
"Jes, imagu - sen iu ajn ekzercado! Kaj la fratoj hurais kaj gratulis min, ĉar mi nun estas plenrajta ministo, kaj ili portis min sur la brakoj kaj tostadis por la falo de la marteloj kaj por la ruinigo de la fandejoj. Jes, mi estis kiel en la sepa ĉielo dum mi iris hejmen kaj de ĉiu aŭdis kian ornamon por la ministoj mi ja estas. Jes, mi paŝis tiel gracie kaj sekure kiel maljuna kaporalo dum la militistekzercado, je tio mi povas ĵuri.
Jes, ĉio glate iris ĝis mi metis la piedon sur la antaŭpordan plataĵon. La bona doktoro ja scias, ke mi, kiel ĉiu ministo, havas grandiozan ferplataĵon antaŭ la pordo. Mi fandis ĝin en nia fandejo kaj ornamis ĝin per initialoj kaj feliĉodonaj trifolioj en la anguloj kaj per la jarciferoj. Kaj nun la edzinaĉo superŝutis ĝin per varmega akvo dum la vespero por forigi la glacion. Kaj tiu akvo, kompreneble, forstiĝis, tiel ke estis nur maldika glacitavolo kiun neniu homo povus vidi. Kiam mi tretis sur ĝin, la kalkanoferoj flugis en la direkto de la polusa stelo, kaj mi batis mian postaĵon tiel ke Dio min kompatu.
Estis tiel ke sonis kaj klako kaj tinto."
"Kion?" mi ne povis ne diri kaj haltis, la pinglo duone trametita - kion li ne rimarkis pro la memoroj...
"Jes, mi ja havis mian poŝbotelon en la postaĵa poŝo, kun initialoj de la Reĝa Majesto Frederiko kaj ĉio. Kaj sur ĝin mi sidiĝis kaj tial mi ŝirvundiĝis tiamaniere."
"Certe, certe, ĉi tie estas akre ŝirite, - tien kaj krucen. Sed kial la ministo ne ekhavis helpon por plastri kiel unua helpo? La vundoj ja devis sangadi tra la tuta nokto."
Li grincis per la dentoj kaj ĵuris kaj antaŭenmetis siajn pugnojn kvazaŭ en spasmoj pro la malespera furiozo kian mi neniam atendus de timplena Sokrates Karlsson.
"Bona doktoro.....silentu....Silentu pro la nomo de Jesuo antaŭ ol mi freneziĝas! Nu, mi devas eligi la tutan mizeron tiel ke mi ne krevos.
Certe mi ne volis sciigi al mia edzino pri mia mizero. Tiukaze mi aŭdados ĝis la mateno de la juĝa tago pri mia ebria stato kaj

ke mi ne eĉ povas min teni rekta en miaj ŝuoj. Tiel, kiel ŝi dum jaroj jam pikadis min kompatindulon ĉar mi ne sukcesis trapasi la ministo-ekzamenon.
Ne, mi fermegis mian dentaron kaj lametis endomen kaj trovis tondilon kaj rulaĵon da plastro, kaj trovis la vojon al la granda salono kie ni havas tian grandan murspegulon, tute samspecan kiel tiu de la paroĥestro. Tie mi deprenis la ministan surtuton kaj la veŝton kaj malsuprentiris la pantalonojn kaj la subpantalonojn kroĉis antaŭen tiel ke mi povas ekvidi la vundojn en la spegulo inter la genuoj. Nu, li eble ne volas kredi tion, sed vidu, mi estas sufiĉe malrigida kvankam oni ne plu estas plene juna. Jen mi mezuris per la rigardo ĉiun vundon, detondis pecon da plastro kaj, la tondilo inter la dentoj, surgluis la plastron, denove mi tondis kaj denove surplastris.
Jes, intertempe oni preskaŭ svenis, kaj la doloroj estis tiaj ke oni volis ululi, kaj mi vidis sunojn antaŭ la okuloj, sed mi ne haltis ĝis mi koviris ĉiun opan vundon. Tiam fine mi povis elspiri, formeti ĉion kaj kunprenante la vestaĵojn kaj ĉion enlitiĝi, kaj Mildulo kiel oni malpliŝarĝiĝis ke ĉio nun pasis. Fine oni sekuriĝis, ke la edzino neniam eksciu grajnon pri la malfeliĉo. Nun oni povas trovi kuracon en silento, kaj - spite al ĉi tiu malbono mi ja iĝis plenaŭtoritata ministo."
"Jes, ĉi tion vi virece faris", mi konfesis. "Lertege, fakte.... Sed la plastron....kial vi ne ankoraŭ havas ilin?"
La ministo Sokrates grincis per la dentoj per penetra sono kvankam mi jam finis la kudradon kaj nur almetis plastron kaj bandaĝojn, kio ja ne povas krei tiajn dolorojn... Sed nun li ululis..
"Jes, jen mi kuŝis kaj mateniĝis kiam la virino malsupreniris por fari matenan kafon, kaj oni vere bonfartis, kvankam la doloroj restis, ĉar....jes, ŝajnis kvazaŭ oni trapasus la ekzamenon dufoje, kaj la dua ne estis malpli grava ol la unua - kvankam pri ĝi mi nur mem povis jubili. Mi pripensadis ĉu mi mem priparolu - tiel iel hazarde - ke mi trapasis la ekzamenon. Aŭ ĉu mi silentu kaj agu kvazaŭ nenio ĝis la edzino kun miro kaj respekto ekscios pere de aliaj kiamaniere mi nun fariĝis plenaŭtoritata ministo laŭ la malnovaj kutimoj.
Sed dum mi kuŝas tie en plena trankvilo, aŭdiĝas teruraj kriado kaj ridaĉado, kaj homoj kolektiĝas kaj ridegaĉas tie sube en la salono kaj mi ne komprenas eĉ detaleton. Tiam envenas la edzinaĉo kaj vere furiozas kaj kriaĉas pri mia ebrieco. Mi ja nur fariĝas de tempo al tempo pli mizera post ĉiu nokto en kiu mi festas, se oni juĝu laŭ mia konduto.
"Silentu, virinaĉo!" mi riproĉe akris kiel neniam antaŭe."Parolu respektplene al mi, ĉar mi nun estas plenaŭtoritata ministo. La tuta posedantaro de la fandejo povas atesti, ke mi trapasis la ekzamenon, kaj ke mi estis tiel firma kaj sobra kiel iu kiam mi hejmeniris. Jes, ĉiu ajn povas atesti ke mi hejmeniris preskaŭ plene sobra."
Sed tiam ŝi frapegis la tablon per sia mano tiel ke ĝi rompiĝis, kaj mokridaĉis tiel ke eĥis tra la tuta mondo kaj eĥos ĉiam estonte.
"Do vi estis sobra...... Sobra, vere! Kaj sobra homo irus meze en la nokto kaj algluus la tutan salonospegulon per strioj da plastro......"

La redakcio de La Skolta Mondo esprimas sian dankon al Helmer Linderholm, ke li tiel afable donis sian permeson al ĉi tiu redono el liaj verkoj.

## SVEDUJO INFORMAS




En Östansjö, Svedujo, komenciĝis Esperanto-kurso por SMU-skoltoj. La kurson gvidas la nemalkonatan Anna Alamo Sandgren, kaj partoprenas ĝin 12 knabinoj kaj 1 knabo. La aĝo de la geskoltoj estas de 8 ĝis 12 jaroj. SMU estas mallongigo por Sveda Misia Gejunularo, kaj estas la junulara organizaĵo de la libera Eklezio Sveda Misia Federacio (SMF), kaj ties skolta branĉo estas la plej granda sveda post la neŭtrala, nereligia. Ni gratulas al s-ino Sandgren kaj ŝiaj gelernantoj kaj deziras plenan sukceson.

Kaj ĉu ne la intereso pligrandiĝus se ĉiu leganto de LSM sendus gajan - kaj bele afrankitan - poŝtkarton al tiuj infanoj?

Ĉu ne tio kreus plie la impreson de la valoro kaj utilo de la internacia lingvo ankaŭ ĉe la gepatroj de la geskoltoj?

La adreso estas:
Anna Alamo Sandgren
Box 7, S-694 02
HALLSBERG 2, Svedujo

## FARU FAJRON PER INTERFROTIGO SVEDA MANIERO





La meza skolto premas forte dum la du per longaj tiroj turnigas la spindelon. Kiam la bazo ekigas fumon, rapidigu la turnigon kaj premu pli forte, ĝis malgranda amaso da ardanta polvo kolektiĝas. Per la pinto de tranĉilo transigu tiun al la seka fajno kaj per blovetado kreu flamon.



El „Scouting"

# iometa ŝpinado



Oni legas nin!
Hungara Vivo n-ro 4/79 skribas:

"Tre kontente mi taksas grava fenomeno, ke origine nur bultenoj, movadcelaj gazetoj pli ofte ol iam publikigas gravajn studojn. Pluraj japanaj bultenoj estas menciindaj tiurilate, krome LA SKOLTA MONDO, pri antikva historio aŭ naturo, LUMO el Kanado, KO=MUNA ESPERANTO-GAZETO de Nederlando....."

UNESKO eldonis etan, belan broŝuron pri sia agado: Kio ĝi estas, kion ĝi faras, kiel ĝi funkcias. La leginda, ilustrita broŝuro finiĝas per nomolisto de la 142 membrolandoj kaj la du asociaj membroj.

Gravaj venontaj skoltaj kunvenoj: Regiona Jamboreo en Perth, Okc. Aŭstralio en la komenco de tiu ĉi jaro. Kontinenta Jamboreo en Dakar, Senegalio, en 1981, kaj en 1983 la Monda Jamboreo eble okazos en Britujo.


Nia nova NR en Jamajko estas Internacia Komisaro de la Skolta Asocio de Jamajko, krome Konsulo ĝenerala de Belgujo en la lando.

La plej granda geskolta asocio en Italujo akceptis novan regularon en decembro 1979 kaj en ĝi la artikolo 81 sub fako 26 mencias insignon pri kapableco "Esperanto-interpretisto."
Se vi volas sendi salutleteron, sendu ĝin al AGESCI, Piazza Pasquale Paoli 18, Roma.

Turisma Esperanto Kalendaro 1980 aperis. Denove la kunlaboro inter Turisma Servo de Tejo kaj la Pola Esperanto Asocio donis tiun frukton, kiu vere estas utila - sed kiu apenaŭ estas profitodona por la eldonistoj. Des pli granda honoro al la eldonistoj. Ili en la malgranda kajero kolektas informojn pri ĉiaj esperantoaranĝoj dise en la mondo kaj rubrikigas ilin laŭ la dato. Ĉu ili ankaŭ havas ĉiujn, mi ne scias - tio dependas de la kunlaboro de ĉiuj aliaj esperantistoj.

La ĝisnuna NR de Brazilio, s-ro Adonis Marcelo Saliba Silva, forlasis sian landon por du jaroj, kaj tial ne plu povas funkcii kiel NR. Kiel nova sin anoncis s-ro Eluizio Bueno Rodrigues, kiu samtempe en letero donas kelkajn informojn:
La Sorokaba Esperanto Klubo kreis Skoltan grupon "Santana", kiu havas 20 skoltojn. La tuta nombro de skoltoj en tiu vastega lando estas nur 30.000. Do, jam per tiu skolta grupo la movado atingis konsiderindan rezulton. Kaj ni - la redakcio - per tio instigas al vi, unuopuloj, sendi salutajn leterojn kaj poŝtkartojn al la 20 skoltoj en "Santana", R. da Penha 455: Cx.P. 234, 18.100 Sorocaba, S.Paulo, Brazilio.

La supre menciita letero havas presitan linion malsube sur la paperfolio:
66a Universala Kongreso de Esperanto - 1981 - Brasília, Brasil.



# *Retrovita*



Dum Svedujo estis grandpotenco, la sveda reĝo ekkonstruis belegan militŝipon, Gustav Wasa - kun grandiozaj ornamentoj en kolorita ligno, grandaj kaj multaj kanonoj k.t.p. Kaj en iu tago la ŝipo estis preta por sia unua vojaĝo. Sed ho ve - jam antaŭ ol ĝi forlasis la havenon de Stockholm la granda ŝipo renversis, subakviĝis kaj pereis. Oni provis savi kelkajn el la kanonoj - sed poste oni forgesis la ŝipon.

Ĝis iu sciencisto 333 jarojn poste pere de studoj en la paperoj kaj en la naturo asertis: Wasa estas retrovebla kaj savebla! Nun la ŝipo denove estas - ne sur la maro, sed en la libero. La foto, kiun ni redonas kun la afabla permeso de la Waza-muzeo, montras la momenton en kiu la ŝipo denove, la unuan fojon, kuŝas sur la akvo sen ies helpo.

Nun la ŝipo - kaj la multajn kaj belajn aĵojn kiujn oni trovis en ĝi - estas videbla en la wasa-muzeo, al kiu vizito vere estas rekomendata.

La sveda poŝto siatempe honoris la retrovon per serio de poŝtmarkoj.

Okazis iam en iu urbo, ke preterpasanto haltis - ĉar apud lumfosto alia homo diligente serĉis. La preterpasanto proponis sian helpon, kaj kune la duo serĉis la perditan valoraĵon. Sed vane. "Ĉu vi tutcerte scias, ke vi perdis ĝin ĉi tie?" demandis la helpemulo. "Ne", respondis la malfeliĉulo. "Mi perdis ĝin ie en tiu apuda strato - sed tie troviĝas neniu stratlumo, pro kio neeblas serĉi tie."

# skolta esperanto-ligo

## naciaj reprezentantoj

A F R I K O :

Madagaskaro: s-ro Roger Randrianekena, T.P. - Box Postale, Ambatondrazaka
Niĝerio: Kon.: Koki Tubota, Arewa Tekstiles Ltd., P.O.Box 288, Kaduna South,Kaduna
Suda Afriko: Per.: Henri W Appel, 8 St.Michael Road, New Redruth, Alberton 1450.

A M E R I K O :

Brazilio: S-ro Eluizio Bueno Rodrigues, Caixa Postal 234, Sorocaba, S.Paulo
Jamajko: D-ro Arpad Ronai, P.B. 10, Kinston 8
Kanado: s-ro John H F Hoyle, Box 421, Forest Ont.
Kostariko: s-ro Marvin Segura, Aptdo 1913, San José.
Peruo: s-ino J de Skotte, Melecon Paul Harris 335/200 Barranco-Lima 4.
Usono: s-ro Robert W Rapp, 2043 Brannon S W, Austell GA 30001. Tlf 404-948-8535

A Z I O :

Indonezio: Per.: S-ro Liem Tjong Hie, ĉe Dian Furniture, Depok 12 A, Semarang
Japanujo: s-ro Sinzo Sumiya, Daido Kagaku Sooti K.K.16, Suekirotvo Kitatu, Osaka.
Libano: s-ro Salah Ghanem, P.O.Box 11-9254, Beirut
Sirio: INTerna KONtakto - pere de CK
Sri Lanka: S-ro Ronald C Peries, 4 Sri Vijaya Road, Colombo 6.
Suda Korea Resp.: s-ro So Gilsu Sodemun, P O Box 59, Seoul 120.
Tajlando: Per.: s-ro Marcel Perray, G.P.O., Box 1846, Bangkok

A Ŭ S T R A L I O :

Aŭstralio: Per.: s-ro J Moore, "La Nesto", Pelican Street, Emu Park, QLD 4703.

E Ŭ R O P O :

Aŭstrio: F-ino Eva-Marie Fraunhofer, Badenstr 7, A-2512 Tribuswinkel/Baden pr Vieno
S-ro Franz Scehwärzler, Rathausstrasse 2, A-6900 Bregenz.
Belgujo: s-ro L J VanGulck, Lt.Lippenslaan 33 bus 10, B-2200 Borgerhout.
Poŝtk.to Belga Skolta Esp.Sekretario 000-0327460-85. Tlf 031-3688.08
Britujo: s-ro David Withey, 21. Brookfield Ave, Waterloo, Liverpool L 22 3ye.
Danlando: s-ro Bjarke Nielsen, Erdalsvej 30, DK-2600 Glostrup.
Finnlando: s-ino Irja Klemola, Nunna, SF-20660 Littoinen.
Francujo: s-ro Patrick Deveughele, 53 Av de Rigny, Appt 64, F-94360 Bry sur Marne
Germanujo: s-ro Rudolf Fisher, G Adolfstrasse 2, D 4401 Nordwalde.
Hispanujo: s-ro S Aragay Galbany, Bassegoda 40-3-1, Barcelona 14. Tlf 333 80 81
Irlando: s-ro Frank Dobbs, 8 Ailesbury Grove, Dublin 4
Islando: Kon: Islanda Esperanto Asocio (pere de Baldur Ragnarsson), Postholf 1081, Reykjavik.
Italujo: s-ro Fr. Abriani, Via Falconetto 24, I-37100 Verona. Tlf 045-525173.
Nederlando: s-ro B J Wijmer, Vreebos 41, Zoetermeer/2280. Tlf 079-215868. Poŝtkonto 3335470.
Norvegujo: s-ro H A Rosbach, Bambleveien 2, N-3700 Skien. Tlf 035-21848. Poŝtkonto 3363389.
Pollando: INTerna KONtakto pere de CK.
Portugalujo: s-ino Maria Teresa Nune Constáncio, Rua Freixo Capitao 16-2º Dto, Agualva-Cacem.
Svedujo: Per.: s-ro Ragnar Hjorth, Kronobergsgt 25, S-11233 Stockholm.
Svislando: s-ro Robert W Rapp, 2043 Brannon S W, Austell GA 30001. Tlf 404-948-8535

Individuaj membroj (nur en landoj sen N.R.!): Kotizo inkl. abono:
Junuloj ĝis 18-jaraj: Ned. gld. 3.30 aŭ egalvaloro.
Pliaĝuloj: Ned. gld. 5.00 aŭ egalvaloro.
Subtenantoj: Minimume Ned. gld. 5.00 aŭ egalvaloro.

Pro la Universala Kongreso, kiu okazos en Stockholmo, ni ĉi tiun fojon prezentas Svedan Numeron.
La fotojn ni prunteprenis ĉe la Sveda Turisma oficejo, kiu afable permesis la uzon.

La kovrila bildo estas la konata profilo de la urbo: La urbodomo, kiu sin spegulas en la lago Mälaren.
La domo konstruiĝis en 1923; desegnis ĝin la arkitekto, profesoro Ragnar Østberg.

Ankaŭ la kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia, KELI, okazos en Svedujo, en Södertälje iom sude de la ĉefurbo.

La Internacia Junulara Kongreso okazos en alia lando, tamen proksime al Stockholmo: Pramo vin portos al Finnlanda urbo Turku, de kie iros aŭtobuso norden - al Raŭma.



LA SKOLTA MONDO REDAKCIO: Bambleveien 2
N 3700 Skien
NE ISSN 0037 6558

KUL